La estraro iniciatis instigfrazon: "Se ĉiuj nun ekler-nus esperanton, la popoloj de la mondo senĝene interparolus post du jaroj". La frazo estis publikigata en gazetanecoj kaj precipe per la slipoj kaj afiŝetoj vendataj al la membroj.

## Esperanta Turista Komisiono

ETK, la vojaĝorganizo de SEF, aranĝis grupvojaĝojn al Nederlando kaj Hispanujo, ĉie petante la helpon de gesamideanoj kaj serĉante kontakton kun ili. Gruparango de Stockholm al la Universala Kongreso de Esperanto en Oslo.

## Ekspozicia centro

Nova centro por ekspozicia materialo startis en 1952 kaj la estraro trovis ejon ĉe s-ro Tandlund, Norrköping. Iom post iom la nova filio donos materialon al la svedaj kluboj. En la nuna momento oni organizas la filion, sed la estraro esperas pri rapida rezulto.

## UEA

Svedaj komitatanoj estis dum la jaro E. Malmgren, J. Ströme, E. Dahl, E. Adamson kaj J. Stenström.

Kiel ĉefdelegito de UEA funkciis E. Adamson.

La 31-an de decembro 1952 UEA havis en Svedujo 208 delegitojn, vic- kaj fakdelegitojn en 128 lokoj kaj entute 462 aktivajn membrojn.

La estraro faris novajn petojn al la klubaj kasistoj ke ili kunhelpu pri la frua enpago de la UEA-kotizoj. Svedujo bezonas pli da delegitoj.

La petojn de UEA la federacio laŭpove plenumis kaj rapide aperigis la gazetartikolon pri UNESKO en konsiderinde multaj gazetoj.

La estraro decidis doni ekonomian apogon al Centro de Esploro kaj Dokumentado por subteni ĝian gravan laboron.

## Sveda Esperanto-Instituto

Dum la jaro 45 personoj trapasis la elementan ekzamenon kaj 4 la superan ekzamenon.

La instituto aranĝis en la somero 1952 du kursojn en Bohusgården, Uddevalla, unu por eksterlandanoj pri svedaj cirkonstancoj kaj la alia por svedoj, la lastenomita perfektiga kurso, preferinde por kursgvidantoj. La aranĝoj estis bonsukcesaj kaj la instituto decidis peti novan ŝtatan subvencion por la jaro 1953.

## Eldona Societo Esperanto

La societo daŭrigis la agadon por akiri novan kapitalon, ĉefe por ebligi la eldonadon de nova vortaro.

S-ro R. Dupuis lerte prizorgis la ekspedojn, kaj la societo planas novaranĝojn.

## Kurslaboro

Al la tutlanda studgvidanto s-ro E. Hult, Arvika, raportis 139 kursoj (studrondoj) por la sezono 1951—1952, kaj la estraro dissendis tre ampleksan kuntiraĵon el la dika raporto de la studgvidanto pri la granda laboro.

La estraro serĉis taŭgan cseh-instruiston per anoncoj. Tamen ne anoncis sin sufiĉe da svedaj kluboj, kiuj havis la ekonomiajn eblecojn.

Dank' al donaco de la Societo Humanitet la estraro povis doni stipendiojn al du gejunuloj partopreni la UK en Oslo.

Ek de la jaro 1952 la tutlanda studgvidanto aŭtomate sendas al ĉiuj kursoj por komencantoj novpresitan broŝuron "Välkommen" (Bonvenon) kun informoj pri la esperantomovado.

## Diversaĵoj

Multaj membroj de SEF partoprenis la Universalan Kongreson de Esperanto en Oslo kaj krom tio diversajn somerajn kursojn kaj aranĝojn.

En Gotenburgo estis aranĝita sukcesa antaŭkongreso antaŭ la UK en Oslo kaj ĝi altiris grandan atenton.

En la sekretario ĉe Tegelbacken SEF nun disponas pri ankoraŭ unu ĉambro kaj sekve havas iom pli da spaco. La sekretario ordigis la officejon; la instalaĵo nun estas moderna kaj faciligas la laboron.

La cirkuleroj de SEF daŭre estis sendataj al la klubaj estraroj en formo de SEF-Infornilo.

La paperoj, kovertoj kaj presadoj de SEF ne nur portas la instigfrazon ek de nun sed ankaŭ la novan federacian klišon.

## Finvortoj

La estraro provis per kelkaj vortoj doni bildon pri la diversflankaj labortaskoj, kiuj ĉiutage estas plenumataj por esperanto kaj nia sveda federacio. Dank' al la sindona laboro de la gesamideanoj en ĉiuj lokoj nia laboro estas ebla.

En la nuna momento ni devas streĉi niajn fortojn por montri al la mondo ke la venko ĉe UNESKO ne estis vana laboro de energiaj gesamideanoj. Ni ĉiuj kune daŭrigu!

Laŭstatute la estrarmandatoj nun estas finitaj por s-roj J. Strönne, H. Törnskog, s-ino Sonja Morariu, f-ino Gulli Svensson kaj la anstataŭanto E. Hult.

Stockholm la 1/5 1953.

Jan Strönne

Bengt Joelsson Harry Törnskog Ruben Enocson  
Gulli Svensson Sonja Morariu Esbjörn Stridell

○

## La "dulingva mondo" estas kritikata

El "Mitteilungen des Instituts für Auslandsbeziehungen", Stuttgart (Informoj de la instituto por eksterlandaj rilatoj), ni citas:

"La projekto enkonduki devigan instruon de la angla lingvo en francaj lernejoj kaj de la franca en anglaj, kaj en alilandaj lernejoj de unu el tiuj lingvoj, renkontis kontraŭdirojn jam en Francujo.

La germanisto kaj anglisto Fernand Mossé tute rifuzas akcepti tiun planon. Li substrekas: 'Nia geografia situacio kaj nia pozicio en la mondo devigas nin pli ol iam disponi ankaŭ pri aliaj antenoj, tiel ekzemple en la slave, en la arabe kaj en la hispane parolantaj mondpartoj. Kaj fine ni ankaŭ devas kuraĝi elparoli tion: se ekzistas lando, kun kiu ni devas subteni plej viglajn rilatojn, ankoraŭ profundigendajn, tio estas antaŭ ĉio nia najbaro orienta.' La anglisto Louis Landré

ĉe Sorbonne turnas sin en la nomo de la ligo de novfilologoj al la instrua ministro: 'Estas nia deziro, ke la germana denove fariĝu lingvo de unua rango en niaj superaj lernejoj, ke la hispana pli disvastiĝu, ke la instruo de la araba ampleksiĝu kaj tiu de la rusa ne malampleksiĝu, fine ke niaj lernantoj kaj studentoj estu instigataj ellerni kromajn eŭropajn, orientajn kaj malproksimorientajn lingvojn.'

○

## Språk och kulturkontakter

Studier av främmande språk skänker den obestridliga förmånen av direkt kontakt — muntlig och skriftlig — med andra folk. Men det största värdet av språkstudier ligger djupare än så. Förtrogenheten med ett främmande idiom öppnar dörren till en annan kulturform och skapar förtrogenhet med ett annat sätt att tänka och resonera. Språkstudier är ett utmärkt medel mot intellektuell inavel. Enspråkigheten skymmer blicken för det värdefulla hos andra och skapar lätt en övertro på den egna förträffligheten, en fara, som inom alla former av vetenskaplig, konstnärlig och annan intellektuell verksamhet i det långa loppet kan bli dödlig.

Professor Bertil Malmberg i Sv. D.

*Överbetonandet av ett enda främmande nationalspråk skapar också lätt en övertro på förträffligheten av ifrågavarande folks kultur och sedvänjor. Esperanto ger kontakt med många folk och deras kulturer.*

Om alla lär sig esperanto nu,  
kan jordens folk tala obehindrat  
med varandra inom två år

Jen bildo de la kunveno de la Asembleo de la Unuiĝintaj Nacioj la 10-an de aprilo, kiam Dag Hammarskjöld estis instalata kiel ĝenerala sekretario de UN. Apud la tribuno oni vidas la prezidanton de la Asembleo, Lester B. Pearson, Kanado, maldekstre de li Dag Hammarskjöld kaj dekstre la eksa ĝenerala sekretario Trygve Lie. Starantoj de maldekstre: Joao Carlos Muniz, Brazilo, prez. de la Sekureca Konsilantaro, Jiri Nosek, Ĉeĥoslovakujo, prez. de la Ekonomia kaj Socia Konsilantaro; Tingfu F. Tsiang, Ĉinujo, Ahmed Galal Eldine Abdelrazek, Egiptujo, Henri Hoppenot, Francujo, Tiburcio Carias, Honduraso, Andrej Višinski, Sovetio, Gladwyn Jebb, Britujo, Henry Cabot Lodge, Usono, Rodolfo Munoz, Argentino, Carlos Romulo, Filipinoj, Alexis Kyrou, Grekujo. (Unations)





Beslutet vid Unescos senaste generalförsamling om en enkät hos regeringarna beträffande de resultat som inom olika länder nåtts med esperanto har väckt ökat intresse för det språk, som dr Zamenhof publicerade för 65 år sedan.

Att tidningspressen i dag talar mindre om esperanto än på den tiden är mycket naturligt. Esperanto är inte längre en nyhet. Dagstidningarna kan inte bli förvånade var gång en internationell kongress eller konferens håller sina överläggningar på esperanto eller en skola i Brasilien eller Japan börjar undervisa i språket. Sådant händer numera för ofta för att kunna väcka sensation. Språket har utvecklats och vunnit utbredning sedan det till att börja med under en lång tid betraktades som en utopi.

Den som i likhet med mig lärde sig esperanto före det första världskriget kan i dag konstatera hur språket på grundval av en helt liten elementär ordlista och en enkel grammatik med endast 16 regler utan undantag kunnat finna sin form och genomgå en inre utveckling. I dag är det mycket rikare och talas mycket bättre än för 30 eller 40 år sedan. På de kongresser, där det användes (möten för studenter, för arbetare, för lärare, tekniker och andra), värderar man den uppnådda enheten och den lätthet, med vilken man diskuterar, utan den hjälp av tröttande översättningar, som karakteriserar de flerspråkiga konferenserna. Vilket framsteg skulle det inte vara, om alla lärde sig det redan i skolan, så att språkmurarna raserades och de internationella förbindelserna underlättades, inte endast för vetenskapsmän utan även för den stora massan!

Då skulle man kunna ägna mera tid åt ett fördjupat studium av modersmålet och av ett främmande språk eller klassiskt språk för att lära känna en annan litteratur. Det skulle vara en verklig vinst för kulturen. I dag är det inte endast en kulturell brist, utan även en personlig plåga att höra engelska, franska eller spanska rådbråkas av en talare, som med svårighet läser ur sitt manuskript, hämmad av den känsla av underlägsenhet, som den alltid lider av som uttrycker sig på en annans språk.

Troligen just för att esperanto befriar människorna från detta mindervärdeskomplex talas det så flytande och med så stor lätthet på kongresser. Man lägger märke till att det tillåter delegater från *alla* länder — inte bara från Frankrike, England och Amerika — att göra sig gällande på sakliga grunder. Finnar, skandinaver, brasilianare, japaner, jugoslaviner låter utan tvekan höra sin röst i en församling som talar esperanto. Esperanto ger rättvisa och likställighet.

En annan orsak till esperantos framgångar är sannolikt den lätthet med vilken man kan bilda ord med hjälp av prefix och suffix. Av ett fåtal ordstammar — de mest internationella från västerländsk syn-

## Esperanto i brännpunkten

*Unesco beslöt vid sin konferens i december 1952 att verkställa en utredning rörande esperantos roll i samhället. Denna artikel av professorn i engelska språket och litteraturen vid universitetet i Neuchâtel Edmond Privat ger några synpunkter på frågan.*

punkt — kan var och en själv bilda avledningar. Detta gör esperanto lättare än andra språk för österlänningar, som endast behöver minnas ordförrådets stomme.

Man tillverkar inte ett språk. Det är användningen som gör det till en levande verklighet. Dr Zamenhof bevisade sin genialitet då han nöjde sig med att vara initiativtagare i stället för skapare av språket. Han gav endast de grundläggande elementen och överlät åt livet att skapa resten. Akademio de Esperanto stadfästade de fackuttryck, som författarna tar i bruk i sina verk. Den ger sanktion åt det som praktiken skapat, och den bevarar kontinuiteten.

Det händer, att den, som aldrig hört ett tal eller en debatt på esperanto, föreställer sig språket som en barbarisk blandning. I själva verket

är esperanto väljudande som spanskan, flytande som rumänskan. Engelska språket är en blandning av saxiska och franska element, som smälte samman under 1300-talet. Språket urdu i Pakistan är en indopersisk blandning, som nu har sina skalder.

Vältalare eller författare med god smak uttrycker sig ledigt på esperanto, liksom de gör på varje annat språk. Det ger en stor tillfredsställelse att kunna läsa artiklar eller böcker, som författats av en kines, en japan eller en holländare, och att göra detta oförmedlat, inte i översättning. Varje vecka ges nya verk ut på esperanto, och det finns ett stort antal esperantotidskrifter. Hur många ens bland akademiker törs utan hjälp publicera något direkt på ett främmande nationalspråk?

När vi lärde oss esperanto, försäkrade oss skeptikerna, att en fransman aldrig skulle kunna förstå en slav eller en engelsman en italienare på esperanto. Praktiken har bevisat motsatsen. Och ju mer språket används, desto mer förenhetligas uttryckssätt och uttal. — Denna min ungdomserfarenhet har gjort mig mycket kritiskt inställd mot profetior från intellektuella kretsar, som vill döma om saker, som de inte är insatta i.

Unescos resolution har den förtjänsten, att den rekommenderar en objektiv undersökning av fakta. Om regeringarna skulle komma överens om att så småningom införa esperanto i skolan, skulle esperantorörelsen gå snabbare fram. Om en sådan överenskommelse inte träffas, kommer språkets vidareutveckling och utbredning att gå i ungefär samma takt som hittills. Denna hittillsvarande utveckling under de 65 åren har, inom parentes, gett till resultat avsevärda språkvetenskapliga erfarenheter.

Det som särskilt torde intressera Unesco är att esperanto bidrar till att hos de människor, som lärt sig språket, skapa en världsmedborgaranda, eftersom det öppnar porten till världen och till de olika civilisationsformerna på vid gavel. Jag själv står i tacksamhetsskuld till esperanto för detta. Och tusentals andra människor kan bekräfta mina ord.

Edmond Privat

## Sveda Somera Semajno

9-16 aŭg 1953.  
Frostavallen, Höör.

Prelegtemaro 1953: Internacia kulturintersaĝo

Sub aŭspicioj de la Sveda Instituto por kulturaj rilatoj kun eksterlando kaj la Sveda Unesco-konsilantaro

Aranĝas: Sveda Esperanto-Instituto

Direktu vin al: Jan Strönné, Amiralsgatan 36, Malmö, Svedujo.

## Utredning om esperanto

Svenska Esperantoförbundet har till Svenska Unescorådet överlämnat en detaljerad utredning beträffande esperantoundervisning och esperantos utbredning i Sverige. Utredningen har begärts av Unescorådet som ett led i den undersökning av esperantos roll i samhället, som Unesco beslöt vid sin konferens i Paris i december.

## Alingsås

La Esperanta Klubo de Alingsås havis sian jarkunvenon kun jarfesto la 23-an de januaro. Jenaj membroj estis elektataj kiel estraranoj: prezidanto Roland Lindblom, ceteraj Arne E. Andersson, Sven Svensson, Bengt Jonsson. Reprezentanto por eld. Soc. Esperanto I. Lagerström. La agado dum la pasinta jaro estis sufiĉe vigla. Oni multe propagandis i. a. per afiŝoj, kaj 130 ekz. de la septembra n-ro de "La Espero" estis disdonataj. En novembro d-ro F. Szilágyi publike prelegis pri esperanto kaj la evoluo de la lingva problemo. Sufiĉe multaj interesuloj ĉeestis. Du studrondoj finstudis en aprilo.

## Arboga

Esperanta klubo de Arboga havis jarkunvenon. Estraro por 1953: Stig Nyqvist prez., Gösta Bergman v. prez., Hjalmar Andersson sek., Sten Almkvist v. sek., Carl-Eric Bergström kasisto.

Post la jarkunveno estis festeto. Carl-Eric Bergström montris filmojn, i. a. de la jarkunveno de SEF 1952 kaj de la kurso en Uddevalla dum julio 1952. Hjalmar Andersson parolis pri siaj spertoj de esperanto. Por tiuj, kiuj ne tute regis la lingvon estis farita sveda traduko, kiu estis vendata por 1 kr. La ricevitan monon la klubo asignis al la helpo por Holando.

Hj. A—n

## Örebro Esperanto-Societo



R. Fredell, E. Carlén, Ph. Jonsson, J. Håkansson

festis la 21-an de marto sian 30-jaran jubileon en hotelo Örebro Hus. Pli ol 50 ges-anoj el diversaj lokoj kolektiĝis, kiam la prez. R. Larsson bonvensalutis. Disp. S. Carlén, Hällabrottet, poste faris historion pri la pasintaj jaroj. Sep personoj fondis la societon kaj de tiuj tri nun ĉeestis, nome E. Carlén, John Håkansson kaj Rikard Fredell. La prez. dankis ilin pro la iniciato kaj la energia laboro en la komenco, kiam la ideo pri mondlingvo estis preskaŭ nekonata. La societo honoris ilin per florbukedoj transdonataj de f-ino Mona Blomqvist. La prezidanto poste faris funebran parolon pri mortintaj membroj kaj ilin oni honoris per silenta minuto. Kelkaj societoj poste transportis bondezirojn al la jubileulo kaj kelkaj telegramoj ankaŭ alvenis. Sekvis distra programo kun filmoj kaj aŭkcio de bildkartoj kaj leteroj ricevitaj de multaj eksterlandaj gesamideanoj. Krome tesupeo, komuna kantado, solkantado de David Palmroth kaj danco. Oni ankaŭ aranĝis loterion kaj lotumis belan pentraĵon faritan de David Palmroth. Li donacis ĝin por lotumado, por kio ni kore dankis al li. Gajnis ĝin f-ino Ada Lundin, Örebro. Dum la festo fotografistoj de du örebroaj gazetoj ankaŭ ĉeestis kaj fotografis la tutan grupon kaj la fondintojn. Krom tiuj ĉeestis ankaŭ s-ro Philip Jansson, Örebro, kiu aliĝis al la societo nur 6 aŭ 7 kunvenojn post la unua. Ĝis nun li estis tre aktiva kaj multjara gvidanto kaj esperantoinstruisto. La festo estis tre agrabla kaj ĝi certe instigos nin ĉiujn al pli vigla laboro por nia movado.

R. L.

## Nova esperantoklubo en Svängsta

La 9-an de januaro la esperanta studrondo de Svängsta, Blekinge, fondis esperantan klubon, al kiu aliĝis 12 membroj. Prezidanto estas s-ro E. A. Lindén, sek. fraŭlino Ingemo Keller kaj kasisto s-ro Sven Nilsson. La nomo de la klubo estas "Lingva unueco" kaj ĝi havos kunvenojn unu fojon monate.

Esperantajn salutojn

L. E. Lindén

## Skövde

Klubo Esperantista de Skövde jarkunvenis la 25-an de januaro. La jarraporto atestis pri vigla jaro 1952; inter la aranĝoj estas menciindaj: jubilea festo pro 20-jara estado, studkonferenco por la Skaraborga Distrikto, prelegovespero kun s-ro Pragano ktp. Kvar diversaj kursoj estas raporteblaj. Por unu el ili ni uzas por ni novan studsistemon; ni en perfektiga kurso uzas esperanton kaj samtempe lernas la historion kaj simile de la urbo.

La estraro por 1953 ricevis jenan aspekton: Prezidanto Gunnar Ringh, sekretario Lars Westman, kasisto Richard Aslund, vicprez. Lennart Johansson kaj vic-sekr. Erna Johansson. Ĉiuj, escepte de la sekretario, estas reelektitaj.

Inter la decidoj ni povas menci kelkajn; la klubo aĉetu biblion kaj donu ĝin al la granda bibliokolekto de eksparlamentano s-ro Karl Magnusson por ke ĝi ankaŭ enhavu esperantolingvan ekzempleron. Samtempe ni faros propagandon per publikigo de la transdono. La kunvenoj okazu ankaŭ ĉi-jare ĉiun unuan kaj trian merkredon monate. La klubo aranĝos grupvojaĝon al Zagreb. Jam aliĝis 12 membroj al la kongreso.

"Goro"

## Lidköping kaj Skara

Je la jarkunveno de la Esperantoklubo de Lidköping la 13/2 ne malpli ol 11 novaj membroj aliĝis al la klubo. 8 el tiuj tamen loĝas en Skara, kie ili, kune kun du malnovaj klubanoj nuntempe ankaŭ loĝantaj tie, formas apartan Skara-sekcion de la klubo. Tiu sekcio konsistas grandparte el novaj esperantistoj kiuj ankoraŭ ne volas fondi memstaran klubon. Sed la distanco inter la du urboj ja ne estas tiel granda, kaj ni esperas, ke bona kunlaboro inter la esperantistoj en Skara kaj Lidköping pli aŭ malpli frue rezultigos en nova, forta esperantoklubo en Skara. La studrondon en Skara gvidas Tage Sjöholm, kaj prezidanto de la nova sekcio fariĝis Ake Svantesson.

La agadraporto de la klubo de Lidköping rakontas pri vigla jaro 1952. Kvar studrondoj laboras, inter kiuj unu por komencantoj kaj unu konversacia. Tiu lasta redaktas kaj eldonas multobligatan kluban gazeton, Nia Parolilo, kiu dum la jaro aperigis tri kvinpaĝajn numerojn.

Specialan atenton oni donis dum la jaro al la klubkunvenoj. La klubo regule kunvenis unufoje ĉiunmonate, kaj je ĉiu kunveno oni havis ian interesan aŭ amuzan programon. Kvin eksterlandaj prelegantoj vizitis la klubon dum la jaro.

Nova aranĝo estis ankaŭ la ĉiusemajnaj renkontiĝoj dum la somera periodo, kiam ne laboras la studrondoj. Tiuj senceremoniaj renkontiĝoj aŭ ekskursoj kun konversacio ĉefe en esperanto estis tre sukcesaj kaj multe stimulis la kluban vivon.

Kiel kutime la intereso por eksterlandaj vojaĝoj estis tre granda. 4 membroj partoprenis la kongreson en Oslo, 9 la SAT-kongreson en Düsseldorf, kaj kelkaj faris tute privatajn vojaĝojn eksterlanden, vizitante geamikojn aŭ alimaniere utiligante esperanton.

La ekstera reklamado estis forta, kaj i. a. oni eldonis kaj distribuis pli ol kvar mil flugfoliojn.

La estraro konsistas el Ake Blomberg, prez., Erik Vallin, sekr.; Erik G. Andersson, kasisto; John Widén kaj Greta Ronnefors. Programkomitato: Alf Johansson, Alf Sundberg, Greta Ronnefors, Knut Lindblom kaj Arne Gustavsson. Ekzamena komitato: Tage Sjöholm, Erik Vallin kaj Knut Lindblom.

A. B.

### Skaraborga distrikto

Skaraborga Distrikto de SEF jarkunvenis en Skara la 8-an de marto. La kunvenon aranĝis la nova grupo en Skara (ankoraŭ nur sekcio de la klubo en Lidköping) kaj estas konstatinde ke ili tre sukcesis.

Ĉiuj estraranoj estas reelektitaj kaj la estraro tial havas jenan aspekton: Prez. Tage Sjöholm (Skara), sekr. Ake Blomberg (Lidköping), kasisto Gunnar Ringh (Skövde), v. prez. Harry Carlsson (Falköping) kaj v. sekr. Erik Brenander (Fyrunga).

De la kunveno estas sendita letero al Radiotjänst kun peto pri baldaŭa rekomenco de la esperanto-elsendoj. La agadraporto de la estraro raportas pri vigla jaro; krom jarkunveno en Lidköping la distr. aranĝis somerrenkontiĝon sur Mösseberg (Falköping) kaj dutagan studkonferencon en Skövde. La nombro de partoprenantoj en la kursoj kompare kun 1951 plialtiĝis 50 procentojn. La plej ĝojiga raporto venis el Leksberg apud Mariestad, antaŭe nekonata loko en esperantaj rondoj, kie instruisto Danielsson startis du kursojn, unu por infanoj de la lernejo kun 16 partoprenantoj kaj unu por plenkreskuloj kun 24 lernantoj. Tia rezulto oni ja devas opinii kontentiga. Tri diversaj proponoj estas senditaj al SEF.

Post la traktadoj sekvis harmonia kunestado kun teŝupeo kaj varia programo. Proksimume 50 personoj ĉeestis la kunvenon.

Ringo

### Ricevitaj

Berlin de hodiaŭ, 4-paĝa faldfolio. Verkehrsamt Berlin, Fasanenstr. 7—8, Berlin-Charlottenburg 2, Germanujo.

Plano de ekskursoj, 38-a UK; Zagreb. Du dukoloraj ilustritaj faldfolioj 8-paĝaj, eldonitaj de Turist, Zrinjevac 18, Zagreb, Jugoslavujo.

Thun en Svislando. 10-paĝa ilustrita faldfolio. Fritz Schwarz, Wiesenstr. 1, Thun-Bn.

Aŭtopramŝipo Fredrikstad-Larvik, Fredrikshavn. Horaro en esperanto.

Lago de Como, 12-paĝa turisma kajero kun belega bild-aldono en koloroj. Ente Provinciale per il Turismo, Como, Italujo.

Florbulboj ankaŭ en via ĝardeno! Belega kolora prospekto 6-paĝa pri nederlandaj floroj. Centraal Bloembollen-Comité, Wilhelminastraat 13 rood, te Haarlem, Nederlando.

Testoj pri grosvarioj. Eksperimentoj pri varioj de legomoj en Norrland. Speco- kaj tipoprovoj pri karotoj. Tri kajeroj de la Stataj Ĝardenaj Eksperimentejoj, en sveda lingvo kun resumoj en angla lingvo kaj esperanto.

4 kajeroj de "Esperanto-Missionen", Evangelia serio, kun traktaĵoj pri bibliaj temoj. Oni sciigas: — La celo de "Esperantomissionen" (Esperanta Misio) estas eldoni kaj laŭeble senpage distribui kristanan literaturon. Jam nun ni ofertas Novajn Testamentojn senpage al ĉiuj interesuloj, krom la kvar kajeroj de "Evangelia serio". Ju pli multnombre kaj frue la esperantistaro petas novelдонаjajn, des pli frue ni povos efektiviĝi niajn planojn. Venonta eldonaĵo havos la titolon "La provo de fido" kaj estos pli ampleksa kajero de nia serio.

La kajeroj ne estas liverataj komisie, nek rabate al libroservoj, nur haveblaj rekte de ni. Kosto por kajeroj 1—4 kune estas 1 resp. kup.; por eldonota kajero 5 ankaŭ 1 resp. kup. Se tia pagebleco ne ekzistas en koncerna lando, senpaga sendado. ESPERANTOMISSIONEN, Klackavägen, Nora stad, Svedujo.

Josef Julius Wecksell

### Dez siaj kantoj plej belaj

Per siaj kantoj plej belaj  
la birdetoj honoras min — —  
nur unu el ili silente  
fuĝas al blua senfin'.

Odorojn plej dolĉajn donas  
la rozoj en suna varm' — —  
nur unu fermas kviete  
sian kronon ĉirkaŭ larm'.

La najadoj rigardas el fonto:  
amat', refreŝigu ĉe ni — —  
nur unu malĝoje mergiĝas  
en profundon for de mi.

El la sveda: F. Lindberg.

### Helmi Josefsson †

Helmi Josefsson forpasis 15/3 1953 en Stokholmo. Fraŭlino Josefsson estis esperantisto de 1909, kiam ŝi partoprenis en mia kurso tuj post la unua UK kaj aliĝis al la Klubo Esperantista de Stokholmo, en kies vivo kaj agado ŝi vigle kunlaboris, ĝis malsano en la lastaj jaroj sordinis ŝin. Antaŭ la unua mondmilito ŝi estis la unua delegito de UEA en nia urbo. En la nomo de la Klubo kaj la amikoj mi parolis kelkajn vortojn por honoro kaj funebro apud la ĉerko ĉe la enteriga ceremonio, al kiu ankaŭ nia Klubo Esperantista sendis florojn kun lasta saluto.

Paul Nylén.

### Bonvenon al Granebo!

La esperantistoj de Norrköping je tre malalta prezo akceptas en sia somerdomo Granebo apud la urbo svedajn kaj eksterlandajn esperantistojn por pli malpli longa restado. Vojaĝantoj kaj feriantoj bonvenaj!

Ĉar la domo ne havas mastrinon, la gastoj devas mem zorgi pri la manĝo kaj servado por si. Litotolajon ĉiu kunportu.

Por informoj bonvolu turni vin al s-ro Josef Pihlström, HSB, Kolmården, tel. Norrköping 950 06.

### Korespondu!

#### Hispanujo

Lertaj hispanaj gelernantoj deziras korespondi kun svedaj gesamideanoj. Skribu multnombre al esperanta fako de la kooperativo: "La Hormiga Martinense", C. Nuria 12—14 (S-M) Barcelono, Hispanujo.


#### Ĉeĥoslovakujo

20-jara esperantisto dez.kor. Jiri Rosypal, Olomouc VI, Pešínova 18.

#### Japanujo

Kun kristanaj studentoj deziras korespondi 21-jara kristano, lernanto de japana literaturo. Naohiro Abe, Honmachi 6—9, Kiryu, Gumma.

Diversaj japanaj studentoj deziras korespondi. Juraj kaj politikaj studentoj skribu por kontaktoj al s-ro A. Takagi, Hunatuki-tyo 2—47, Kita-ku, Nagoya; sociologiaj studentoj al s-ro M. Akada, ĉe s-ro Mori, Matubara-tyo 4—138, Setadani-ku, Tokio; matematikaj kaj natursciencaj studentoj al s-ro E. Otsuka, Hashigaoka, Hirakata.



38-a  
Universala Kongreso  
de Esperanto

Zagreb, 25/7 — 1/8 1953  
Poŝtfako 213, Zagreb.

**Gruppresan**

var skisserad i januarinumret. Särtryck kan på begäran erhållas hos Svenska Esperanto-Förbundet, Tegelbacken, Stockholm.

Alla inbetalningar skall ske till Svenska Esperanto-Förbundet, Tegelbacken, Stockholm, postgirokonto 2012, som sedan vidarebefordrar.

**Vizoj:**

La koncerna ministerio informis, ke por la kongreso ĉiuj personoj ricevos la "turistan vizon". Sekve kiam kongresanoj petas vizon por Jugoslavujo ili nepre menciui, ke temas pri vizito al la esperanta kongreso. Rilate al tio, ne estas necese posedi invitan leteron el Jugoslavujo (kiel skribis al ni iuj kongresanoj).

**Dogano:**

Kiel en ĉiuj doganaj stacioj en ĉiuj landoj, ankaŭ en la jugoslavaj oni traserĉas la valizojn. La LKK atentigas ke vojaĝantoj devas pagi imposton pri varoj, kiuj ne estas personaj. Krome, por tiuj kiuj eble pripensas sendi paketojn en Jugoslavujon, ni avizas, ke la enlanda ricevonto pagas bazan doganan imposton por ĉiu aparta paketo (Din. 200) antaŭ ol ricevi ĝin, plus eventualan imposton rilate al la koncerna varo, je ricevo.

**Oratora Konkurso de UEA:**

La temo por la nuna kongreso estas "La rolo de Esperanto en la internacia proksimigo de la junularo." La kondiĉoj de partopreno troviĝos en la Kongresa Libro, jam en preparo.

**Postkongreso:**

La organiza komitato de la Postkongreso en Ljubljana presigis informan prospekton kun ĉiuj detaloj kaj prezoj. Ĝi estas sendita al ĉiuj aliĝintoj al la 38-a UK. Pluaj ekzempleroj estas haveblaj ĉe Esperanta Postkongreso, Miklošičeva Ljubljana.

**Statistiko (ĝis 31 marto):**

Sumo 929 el 26 landoj (pasintjare 960).

# Svenska Esperanto-Tidningen

La Espero

Organ för Svenska Esperanto-Förbundet.

**Ansvarig utgivare:** W. Wahlund.

**Redaktoro:** förste postassistent Bengt Joelsson.  
Tel. hejma: 19 78 05, laboreja: 22 65 00, branĉo 639.

**Adreso:** Box 19071, Stockholm 19, Svedujo. Urgaĵojn sendu al la red. persone kun adr. Husabyvägen 1 III, Hägersten.

**Prezo de abono:** por 1953 (12 n-roj) 6 sv. kr., duonjaro 3:50. Eksterlanda abono 7 sv. kr. aŭ 23 resp. kuponoj. Unuopa n-ro 60 öre.

**Prezo de anoncoj:** 1/1-paĝo 90:—, 1/2=50:—, 1/4=30:—, 1/8=15:50, 1/16=8:—, 25 öre por mm. Korespondaj anoncetoj: 25 vortoj=2:—, 50 vortoj=4:—.

**Eldona Societo Esperanto s. p. r. (Förlagsföreningen Esperanto u. p. a.)**

Adreso: Box 19071, Stockholm 19. Ejo Sveavägen 98 VI, malf. 10h—15h. Tel. 31 65 01. Estro: Sune Ahlm, tel. hejma 50 88 05. Poŝtgiro 578.

**Sveda Esperanto-Federacio (Svenska Esperanto-Förbundet).**

**Prezidanto:** riksbanksrevisor Jan Strönnö, Amiralsg. 36, Malmö. Tel. 292 11.

Adreso Tegelbacken, Stockholm C. Tel. 20 00 43. Poŝtgiro 20 12. La oficejo estas malfermita lunde kaj ĵaŭde 19h-21h. Priv. tel. de la sekr. Harry Törnskog 47 32 88.

Kotizoj por izolaj membroj 1953: 12 kr, junuloj 5 kr, familia membro sen gazeto 5 kr resp. 2 kr.

**Studgvidanto de SEF:** Einar Hult, Boställsvägen 9, Arvika. Al li sendu ĉiajn raportojn pri kursoj.

**Esperantofrämjandet.** Poŝtgiro 90 08 08.

**Esperanta Turista Komisiono.** Tegelbacken, Stockholm. Tel. 20 00 43. Poŝtgiro 503 60.

**Sveda Esperanto-Instituto.** Adreso: Birger Gerdman, Sibylleg. 831, Stockholm, tel. 60 49 72. Poŝtgiro 5 15 11.

**Universala Esperanto-Asocio.**

Ĉefdelegito red. Einar Adamsson, Värmlandsg. 18, Göteborg. Tel. 14 58 40, poŝtgiro 4 43 81.

Kotizoj 1953: membro kun jarlibro 5:50 kr, membro-abonanto 14:50 kr, subtenanto 20 kr, patrono 145 kr, dumviva membro 290 kr.

## HELSINGØR.

Internaciaj Feriaj Esperantokursoj, 18—25 julio.

Konversacia kurso, prepara kurso por ĉe-metodaj geinstruontoj, daŭriga kurso k. t. p. Unu semajno inter centoj da ges-anoj el 12 aŭ 15 landoj. Senpaga prospekto havebla ĉe

s-ro L. Friis,

Ingemannsvej 9, Aabyhøj, Danlando.

# YTONG

La malvarma norda klimato necesigas varmizolajn ekstermurojn. Ordinara konstrumaterialo tial estis ligno, speciale en kamparo kaj urbetoj. La lignaj konstruaĵoj tamen kaŭzis multajn brulakcidentojn.

Dank al la sveda invento "Ytong" oni nun je modera kosto povas konstrui brulreziste sed varme en malvarma klimato. Ytong estas poroza betono, tiel malpeza ke ĝi povas naĝi sur akvo, sed tamen fortika.

Svedlingva broŝuro havebla senkoste.

YXHULTS STENHUGGERI A. B.  
Hällabrottet